

espero katolika

rm



monata revuo
fondita en jaro
1903
oficiala organo
de I.K.U.E.

INTERNACIA KATOLIKA
UNUIĜO ESPERANTISTA

internacia katolika unuiĝo esperantista

fondita en 1910
honora prezidanto:
pastro A. Beckers

Centra Oficejo
CH-9106 Zürchersmühle - Urnäsch
Svislando

Oficiala Revuo
Espero Katolika
(Fondita en 1903)

Redaktoro:
P. Felice Ruaro
37010 Costermano (Vr)
Italujo

Abonkotizo
sFr. 14,=

Cirkulero de la Prezidanto

Karaj IKUE-anoj,

Pastoro Burkhardt, prezidanto de KELI, komunikis al mi, ke tre malmultaj membroj de IKUE aliĝis al nia Kongreso. Tio ĉagrenas min. Mi povas ja kompreni la kaŭzojn: la kongresejo estas malproksima kaj havas tro malmultajn unu- kaj dultajn ĉambrojn; multaj aliĝiloj alvenis tro malfrue; kelkaj anoj preferas partopreni la Universalan Kongreson...

Mi invitas vin konsideri la grandan utilecon de nia ekumena kunveno kaj superi ĉiujn malfacilaĵojn.

La organizantoj preferis junularan hejmon, ĉar la hoteloj estas tro multekostaj.

Ankaŭ tiuj, kiuj ne samopinias kun la estraro pri la sinteno de IKUE, estos bonvenaj: ni estos plene malfermitaj al serena kaj frata dialogo kaj aŭskultos respektoplene la konsilojn kaj proponojn de ĉiuj. Por tiu tempo estos preta la jarlibro.

Mi salutas vin elkore kun la espero ke la nombro de la partoprenontoj plialtiĝos. Niaj pensoj iros al multaj orientaj gefratoj, kiuj volus veni sed nur spirite povos partopreni la Kongreson.

Prezidanto de IKUE

SAC. F. LONGONI

A N O N C O J

Tria kongreso de Kristana Esperantistoj: 20.-27. julio 1974.

*Kongresejo: Jugendpark Hamburg-Langenhorn, Jugendparkweg 60,
D-2 Hamburg 62.*

LKK-adreso: Hella Lanka, D-2 Hamburg 60, Cesar Klein-Ring 14.

Poŝtkonto: Helga Brodthage, Hamburg 389194-209.

Ĝenerala temo: «Li la Majstro, ni la fratoj».

PROVIZORA PROGRAMO

Sab. 20.7. Kunsido de la estraranoj kaj funkciuloj, alveno de la kongresanoj, 20 h. Interkona Vespero.

Dim. 21.7. 9 h. Solena Inaŭguro; 13,30 h. busveturado; 17 h. Ekumena Diservo; 20 h. Vespero de kantoj.

Lun. Meso, resp. prot. Diservo; 9,15 h. Prelego kun diskuto; libera posttagmezo aŭ busveturo al «Rauhes Haus»; 20 h. Vespera programo.

Mard. Meso, resp. prot. Diservo aŭ ekumena Diservo; 9,15 h. prelego kun diskuto. Grupkunvenoj, 20 h. Vespera programo.

Merkr. Tuttaga ekskurso; 20 h. varia programo kun artistoj, iudantoj...

Ĵaud. Diservoj; 9,15 ĝenerala kunveno de IKUE, jarkunveno de KELI; Posttagmeze daŭrigo de la kunvenoj; 20 Vespera programo decidota.

Vendr. Diservoj; 9,15 h. prelego kun diskuto; posttagmeze vizito de la urbo kaj de la haveno; 20 h. folkloro vespero.

Sab. Ekumena Diservo, forveturo de la kongresanoj, aŭ veturo al la Hamburga Kongr. Centro.

Kelkaj samideanoj restos en Hamburgo por la Universala Kongreso, kies solena Inaŭguro okazos dimanĉon matene 28.7.1974.

La mirinda ekzemplo de nia Prezidanto, kiu dum 10 tagoj estas malproksime de sia granda paroĥo (kun preskaŭ 20.000 fideluloj), incitas nin fari ĉion eblan por partopreni. Eventuale petu aliĝilon de nia sekretario aŭ de via reprezentanto.



ADRESOJ

Sac. F. Longoni, prezidanto de IKUE
Limbiate, MILANO, Italujo.


S-ro Franco Galbusera, sekretario de IKUE kaj ekspedisto de EK:
Vicolo Ghiacciaia, 6 - I-37100 VERONA, Italujo.

S-ro P. Scherer-Graber, kasisto de IKUE:
CH-6020 EMMENBRÜCKE (LU), Erlenstr. 58, Svilando.



ALVOKO AL JUGOSLAVIAJ LEGANTOJ

La peranto por Jugoslavio (S-ro Ferenc Dongo, Paliĉ, Javorska ul. 4, Jugoslavio) petas de la jugoslaviaj gelegantoj, kiuj ne sendis la jarkotizon, ke ili per poŝtkarto donu vivsignon pri si, sendepende ĉu ili deziras sendi jarabonon aŭ ne.



KATOLIKA HORIZONTO

DOKUMENTO PRI LA VIRGULINO MARIA

Komence de aprilo oni publikigis la apostolan leteron de Paŭlo VI-a pri la kulto de la Virgulino. La dokumento respondas al bezono tre sentata: agnoski la rolon de la virino en la nuntempa societo.

La moderna virino — rimarkas la papa letero — deziras partopreni la decidpovon kaj la elektojn de la societo; ŝi trovas en Maria la ekzemplon de virino, kiu en sia dialogo kun Dio donas sian liberan kaj aktivan konsenton ne al la solvo de provizora problemo, sed al tre grava okazaĵo: al la homiĝo de la Dia Filo.

En tiu perspektivo la dokumento montras, ke la Virgulino estas granda modelo por ĉiu virino kaj por la tuta Eklezio.

La kulto de Maria ne malutilas la kulton de Kristo, eĉ ĝi tenas Kriston en la centro de la kulto.

Inter la neliturgiaj piaj formoj honore al Maria oni mencias la Rozarion kaj la Anĝeluson. Tamen oni konsilas trovi aliajn novajn formojn kaj renovigi la malnovajn, evitante ĉiun troigojn kaj devojiĝojn kaj restante fidelaj al la Biblio kaj al la teologio.

La papa letero konkludas tiel: «Al la nuntempa homo, turmentata kaj ofte vivanta inter angoro kaj espero, la Virgulino Maria oferas serenan vidaĵon kaj trankviligan parolon: la venkon de la espero super la angoro».



PASKO EN VATIKANO

Paŭlo VI-a celebris la solenan Meson sur la granda placo de S. Petro en latina lingvo. Negro legis la unuan legaĵon angle kaj blankulo la duan legaĵon france. Oni legis la porpetajn preĝojn en ses lingvoj. Inter la multaj komuniantoj estis ankaŭ grupo da knabinoj el Koreo. Dum la disdonado de la Komunio ĥoro da klerikoj de la germana kolegio kantis malnovan latinan himnon.

Post la Meso la Papo adresis sian mesaĝon de «ĝojo kaj paco» al la katolikaro kaj al la tuta mondo el la centra loĝio de la baziliko. Poste Paŭlo VI-a esprimis siajn bondezirojn en 12 lingvoj kaj fine donis sian benon «Urbi et orbi» (al Romo kaj al la mondo).



ITALA EPISKOPARO PRI LA EDZECO

La 12-an de majo okazos en Italujo popola referendumo por nuligi aŭ aprobi la leĝon, kiu antaŭ du jaroj enkondukis la eksedziĝon en la landon. La itala episkoparo lasttempe faris gravajn dokumentojn pri edzeco kaj familio kaj ankaŭ en februaro de tiu ĉi jaro ĝi volis doni «paŝtistan direktivon al ĉiuj, kiuj volas travivi en la spirito de la Evangelio la nunan historion de nia lando».

La episkopa direktivo havas 4 paragrafojn:

1. La edzeco estas nerompebla laŭ sia naturo.

2. La unueco de la familio estas necesa al la bono de la familio; la eksedziĝo estas «socia plago», laŭ la vorto de la Vatikana Koncilo.
3. La kristano kiel civitano devas proponi kaj defendi sian familian modelon.
4. Komparo de ideoj ne povas fariĝi preteksto de religia batalo.

La laikisma gazetaro reagis kritike al tiu ĉi letero de la episkopoj, kvazaŭ ĝi estus uzurpo, sed la katolika gazetaro klarigis tre bone ĉion kaj defendis la rajton de la episkopoj doni animzorgajn direktivojn al siaj fideluloj.



DOM HELDER CAMARA

Dom H. Camara, ĉefepiskopo de Recife (Brazilo), je la 11-a de februaro ricevis en Oslo la «Popolan Nobelpremion» pro sia agado favore al la justeco kaj paco en la mondo. Dom H. Camara estas nomata interalie «voĉo de tiuj, kiuj ne havas voĉon», ĉar li defendas humilajn homojn, kiuj ne havas forton por defendi siajn rajtojn. Li deklaris, ke li transdonos la ricevitan monon (duon-miliono da kronoj) al malriĉuloj.



NOVA REGULARO DE LA PENTO

La Kongregacio por la Dia Kulto publikigis en februaro novan libron pri la liturgia reformo, kun la latina titolo «Ordo paenitentiae». La noveco ne devas esti serĉata en la doktrino, sed en la direktivoj por la praktika uzo de la pentofara sakramento, kiu estas nomata prefere «repaciĝo» aŭ «repaciga sakramento».



ALVOKO POR SANKTA LANDO

Paulo VI-a en marto sendis al la katolikaro leteron, en kiu li invitas helpi la lokan eklezion de la lando, kie Kristo vivis. Laŭ tiu alvoko ĉiujare en la Sankta Vendredo aŭ en alia tago oni kolektos monon por la Santa Lando.

EL LA MONDO ESPERANTISTA

SONBENDOJ EN ESPERANTO

La sekcio «magnetofonaj sonbendoj» de UEA posedas nun 348 diversajn programojn, inter ili paroladojn dum la kongresoj de Vieno kaj Portland.



BIBLIOTEKO HODLER

Dank' al la instalo de moderna kserografia kopiilo en la Domo de UEA en Rotterdam, la tuta riĉaĵo de la Biblioteko Hodler kun multaj miloj da libroj kaj gazetkolektoj estas nun atingebla je moderaj prezoj ĉie ajn en la mondo. La fotokopia Servo de UEA volonte plenumas mendojn pri volumoj el sia kolekto. Petu oferton pri specifa verko aŭ kompletan liston de la jam pretaj kopioj!



MILANA FOIRO

La Itala Esperantista Federacio, la centro por enkonduko de Esperanto en la komercon, industrion kaj turismon (CEKIT) kaj la esperantista klubo de Milano prezentis, aprile, en stando de la foiro librojn, ĵurnalojn, diskojn, revuojn kaj manifestojn esperantlingve. Volontuloj el la tuta Italio donis al tiuj, kiuj havas intereson por la lingva problemo, informojn kaj konsilojn.



INTERESA TEZO

Ĉe la fako «Politikaj Sciencoj» de la universitato de Torino oni preparas tezon titolitan «La katolika Esperantista movado en Italujo».



FILMO EN ESPERANTO

La aŭstria televido la pasintan novembron dissendis filmon en Esperanto: «Aŭstralio adiaŭ!».

KLINIKO ESPERANTO

En Brazilo, en Belo Horiconte, estis inaŭgurita oficiale «Kliniko Esperanto».



PLACO ESPERANTO

Estas preta nova prospekto pri Göteborg (Svedujo). La mapo montras, ke en la centro de la urbo troviĝas «Placo Esperanto».



TELEFONAJ BUDOJ

En Nederlando la publikaj telefonaj budoj havas direktivojn por la uzo, en diversaj naciaj lingvoj kaj en Esperanto.



RADIO - DISKO DE NIKOLAJ RYTJKOV

«Grupo Kvin: Esperanto en la Radio kaj Televido» estis lanĉita de la Urbestro de Brighton dum la tiea Brita Esperanto-Kongreso en 1972. La impona publika inaŭguro generis grandan entuziasmon kaj optimismon pri la celo de la nova organizaĵo, nome Esperanto-kursoj en la radio kaj televido.

Kun granda intereso sekvis la evoluon de la agado la konata Esperanto-aktoro, kiel ankaŭ radio-aktoro, Nikolaj Rytjkov. En aprilo de 1973 Nikolaj Rytjkov partoprenis en la prov-registroj por la unua radio-kurso de «Grupo Kvin». La ceteron de la laboro li tamen devis prokrasti pro sia profesia okupiĝo pri ruslingva kurso, kaj pri sia debuto en la angla teatro. Bedaŭrinde, je la unua de septembro li mortis, kaj ne povis partopreni en la finregistro. Tamen lia kontribuo estas granda.

Multaj el la literaturaj recitaloj de Nikolaj Rytjkov, kiujn li ofte prezentis en la londona Esperanto-Klubo kaj aliloke, estis bonkvalite registritaj de la organizanto de «Grupo Kvin», Peter Schilperoord. Certe multaj Esperanto-parolantoj ĉirkaŭ la mondo deziras kapti la okazon raviĝi de lia literatura muziko. «Grupo Kvin» aŭspicias la eldonon de longdaŭra gramofon-disko «Elektitaj Eroj de Nikolaj Rytjkov».

«Grupo Kvin» celas uzi la diskon ankaŭ por imponi al radio-instancoj. Aŭdinte erojn el la disko la respondeculoj sendube konstatos ke Esperanto ja havas plej lirikan literaturon, prezentitan je profesia nivelo, kaj ili impresiĝos pri tio, ke ekzistas sufiĉe granda merkato por ĝin eldoni. Ĝi nepre kontribuos al la prestiĝo de «Grupo Kvin» — do al Esperanto. Eventualan uzon de la disko por radio-elsendoj oni antaŭvidas. Ankaŭ legantoj de via gazeto (aŭskultantoj de via radio-elsendo) rajtas havigi al si tiun diskon.

Jen la detaloj kaj kondiĉoj:

ELEKTITAJ EROJ DE NIKOLAJ RYTJKOV

18 eroj aranĝitaj sub redaktado de Reto Rossetti
(la disko ne havas politike tendencan materialon)

Daŭro: proks. 45 minutojn.

Eldono: sub aŭspicio de GROUP FIVE: ESPERANTO ON RADIO & TELEVISION (Grupo Kvin: Esperanto en la Radio kaj Televido).

Prezo: 15 guldenoj aŭ egalvaloro, plus sendkosto 10% plus eventuala vialanda imposto.

Liverdato: estos en printempo 1974 (energikrizo permesanta).

Favora kondiĉo por antaŭmendantoj: Aĉetantoj, kiuj mendos la diskon kunsamtempa pago antaŭ la fino de marto, 1974, ricevos aldone senpagan portreton de Nikolaj Rytjkov, pentritan de la japana artistino Misako Aihara.

Formato de la portreto ĉ. 19 cm. x 25 cm.

Mendo: Tuj ĉe via (kutima) libroservo aŭ ĉe U.E.A., Nieuwe Binneweg 176, Rotterdam - 3002, Nederlando.

Revendistoj: Petu kondiĉojn ĉe U.E.A.

— Vi ne povas imagi tiujn homamasojn antaŭ la kaso, kiam oni la unuanfojon prezentis mian lastan dramon!

— Ho, ne diru, kaj ĉu efektive oni al, ĉiu redonis enirpagon?

— Diru patreto, ĉu mi povus edzinigi knabinon, malpli inteligentan ol mi ?

— Certo, se ekzistus tia virino.

VENTO POR NIA MUELILO

LA VITRA BABEL-TURO

En la januara numero de «Esperanto» oni legas:

«Ampleksigita uzo de la ĉina kaj araba lingvoj en la laboro de Unuiĝintaj Nacioj minacas ne nur kompletan kaj definitivan babeliĝon de la novjorka sidejo de la internacia organizaĵo, sed ĝi krom tio ŝargas ankaŭ la buĝeton de UN per pliaj milionoj da dolaroj. Pri ĉio jam raportis la tutmonda gazetaro, kiel atendeble — ne ĉiam ĝuste aprezante la problemojn, kiujn kreas la multlingveco». Kun la alveno de la ĉinaj reprezentantoj la nombro de la interpretistoj preskaŭ duobligis. La plena uzo de la ĉina lingvo devigos presigi 18.000 paĝojn da tradukoj kaj dungi tiucele 84 ĉinlingvaj spertulojn aldone al tiuj nun en la paglisto kaj 16 portempajn postenulojn dum la ĉiujaraj sesioj de la Ĝenerala Asembleo. Almenaŭ 18 interpretistoj estus bezonataj por komenci la arablingvan laboron, kaj la aldono postulus pliigojn en la 5 ekzistantaj lingvoj ankaŭ.

La artikolo konkludas tiel: «Oni scias pri la klopodoj akiri por aliaj lingvoj oficialan rangon, kio vekas eĉ aldonan timon en la vitra Babelturo ĉe la rivero East de Novjorko».

FREMDA LINGVO KAJ ELMIGRINTOJ

En la religia revuo «Il messaggero di S. Antonio» (junio 1973) oni legas interesan artikolon, kiun ni konigas al niaj legantoj en la traduko de Radio-Roma-Esperanto.

«Se estas vere, ke la lingvokonfuzo datumas de la Babelturo, oni devas agnoski, ke pro ĉi tiu dia puno precipe suferas la elmigrintoj. Ne ekzistas pli peniga kondamno, eksterlande, ol ne sukcesi kompreni kaj esti komprenata, kaj — evidente — ĝuste la plej malriĉaj suferas pro la lingva diverseco.

La riĉuloj kapablas komprenigi sin ĉie dank' al lingvo universale konata, la mono... En la monda historio ne mankis klopodoj rekonduki la homojn al unu sola lingvo. Post la entreprenoj de Aleksandro la granda, granda

parto el la mondo komencis paroli greklingve, kiel la konkerintoj. Sekve de la romiaj venkoj latina lingvo fariĝis ĝenerale akceptata, kaj longtempe restis kiel lingvo de kulturo kaj katolika religio. Hodiaŭ alia lingvo konkeras la mondon, la angla. Puŝitaj de la angla, aliaj naciaj lingvoj laŭgrade cedas; jam oni kutime parolas kaj pensas per anglaj esprimoj. Ĝuste ĉi tiuj konsideroj helpas kompreni la dian celon de la lingvokonfuzo ĉe Bebelturo: la ekzisto de unu sola parolo estas koneksa kun superregado fare de potenculoj kaj konkerintoj, kaj Dio ne povas longtempe toleri tiun falsan lingvan universalecon».

Financa Raporto pri la IKUE-kaso por la jaro 1973

SVISAJ FRANKOJ

	<i>Enspezoj</i>	<i>Elspezoj</i>
Saldo la 1-an de jan. 73	3296.—	
Kotizoj	6446.26	33.—
Libroservo	70.—	
Fonduso «Nepagipovaj membroj»	89.65	
Fonduso «Espero Katolika»	15.80	
Donacoj	4993.15	
Biloj - rentumo	201.25	
El la ŝparlibro	2000.—	
Diversaĵoj	187.44	83.39
EK presado kaj afrankado		9548.60
Administrado		1150.58
	<hr/>	<hr/>
	17299.57	10815.57
Saldo la 31-an de dec. 73		6484.—
	<hr/>	<hr/>
	17299.57	17299.57

Posedaĵo la 31-an de decembro 1973

Saldo (= banka konto kuranta)	6484.—
Sparlibro no. 36493 (St. Gallen)	1253.40
Belgaj obligacioj	3940.—
	<hr/>
P o s e d a ĵ o	11677.40

Komparo de la posedaĵoj

Posedaĵo la 31-an de dec. 72	10809.—
Posedaĵo la 31-an de dec. 73	11677.40
	<hr/>
Pliiĝo	868.40

Emmenbrücke, la 28-an de februaro 1974.

La kasisto: *Paul Scherer*

Komentario al la Kasa Raporto 1973

La librotenado de internacia kaso — tiukaze do tiu de IKUE — precipe en la vidpunkto de la kotizpagoj estas nefacile travidebla. Dum la jaro 1973 enkasiĝis sv.fr. 6198.50 de 461 membroj. (La mankanta resto venis de hispana Dumviva Membro). Sed mi nur parte scias, por kiom da membroj kaj por kiu jaro ili validas, ĉar kelkaj landaj Rerezentantoj bedaŭrinde tion ne sciigas al mi.

La grandaspekta sumo de fr. 1150.58 por la administrado enhavas la redaktoran salajron.

Mirinde altaj estas la donacoj, ĉefe kaŭzita de sinjoro Tuinder, kiu transdonis donacis al ni gajnon el loterio. Multegan dankon.

Nia posedaĵo pliiĝis je fr. 868.40. Bonvolu kompari ĉi-tiun sumon kun la donacoj. Dankon al Dio.

Raporto de la kas-kontrolantoj

La subskribintoj kotrolis plurajn erojn de la librotenado, komparintaj pruvilojn kun la konto-libro kaj la bankaj eltiroj. Ĉio troviĝas en bona ordo. Ankaŭ la sumoj de la biloj estas ĝuste transskribitaj en la posedaĵan kalkulon.

Rapport der Kassa-Revisoren

Die Unterzeichneten haben mehree Einzelheiten der Buchhaltung kontrolliert, indem sie Belege mit dem Kontobuch und den Bankauszügen verglichen haben. Es ist alles in Ordnung. Auch die Beträge der Wertschriften sind richtig in die Vermögensrechnung übertragen.

Emmenbrücke, la 28-an de februaro 1974, die Kassa-Revisoren:

Alois Stadelmann

Hansrudolf Bucheli

Günther Albert

BUDĜETO 1974

Enspezoj

Kotizoj	7500.—
Fonduso «Nepagipovaj membroj»	200.—
Fonduso «Espero Katolika»	100.—
Donacoj	2000.—
Biloj - rentumo	300.—
Diversaĵoj	900.—
	<hr/>
	11000.—

Elspezoj

EK presado kaj afrankado	10000.—
Kongreso	800.—
Administrado	1000.—
Diversaĵoj	200.—
	<hr/>
	12000.—

Komentario al la budĝeto 1974

Surbaze de la pasintjaraj spertoj mi riskas prognozi deficiton de fr. 1000.— por la nuna jaro, ĉar la pli malpli favoraj saldoj devenis de eksterordinaraj kaj ne atenditaj pagoj, kiuj ne rajtigas nin rigardi nian financon sanan.

Tial mi alvokas ĉiun landan reprezentanton kaj ankaŭ ĉiun membron, trovi la minimume 100 pagipovajn membrojn, de kiuj mankas la kotizpagoj, ĉar de la entute 740 IKUE-anoj estas maksimume 180, kiuj aŭ ne povas pagi aŭ estas DM. Restas do minimume 560 pagantoj, sed en 1973 pagis nur 461. Certe vi komprenas mian plendon kaj helpas al nia kaso. Dankon.

Emmenbrücke, la 28-an de februaro 1974

Paul Scherer

ĈE LA KURACISTO:

- Sinjoro doktoro, miaj migrenoj estas ciutage pli teruraj. Kion mi faru?
- Vi devas ditri vin, sinjorino Kredu, nenio pli bona ekzistas.
- Nu, jes, por vi estas facile diri — distru vin — sed vi, sinjoro doktoro, ne povas imagi, kiel min mia edzo gardas!

EKUMENAJ INFORMOJ

▶ NOVA LIBRO PRI LUTERO KAJ KALVINO

«Kalvino kaj Lutero» estas titolo de nova libro verkita de p. Boyer, emerita profesoro en la Pontifika Gregoria Universitato kaj prezidanto de la internacia asocio «Unitas». En la enkonduko de la libro la jezuita pastro informas nin, ke de jarcenta kvarono li okupiĝas pri ekumena movado. Ĝia komenco — li diris — okazis ĉirkaŭ la jaro 1910-a, kiam la anglikana konfesio faris kelkajn paŝojn renkonte al la protestantoj. Granda antaŭenpaŝo estis farita en 1948, kiam fondiĝis en Amsterdam la Ekumena konsilio de la Eklezioj. La katolika Eklezio ne estis kaj ankaŭ hodiaŭ ne estas inter ĝiaj membroj; sed ĝi laboras kun tiu institucio. La libro «Kalvino kaj Lutero» ne estas disputema libro; ĝi intencas prezenti ilian doktrinon kia ĝi estas, akcentante la punktojn, en kiuj ili malproksimiĝas de la roma Eklezio.

P. Boyer pritraktas precipe la Kalvinan doktrinon. Li diras, ke notinda kvanto de la kristana doktrino estis gardata de Kalvino kaj li estus povinta skribi siajn plej belajn paĝojn, eĉ pli bone, restante en la katolika Eklezio.

▶ MERITOJ DE RAMSEY

Post la baldaŭa eksiĝo de la ĉefepiskopo de Canterbury, primaso de Anglujo, la katolika Eklezio perdis sinceran amikon, al kiu oni ŝuldas la amikan dialogon inter la romkatolika Eklezio kaj la anglikana komunumo de Anglujo.

La historia renkonto en la marto 1966 en Vatikano signas gravan kaj decidan paŝon sur la vojo de la unuiĝo de la anglikanoj kun la katolikoj. Paŭlo VI-a diris tiam: «Ni komprenas la altvaloran signifon de tiu ĉi renkontiĝo: la kredantoj je Kristo ĉeestas spirite, la mondo observas, la historio memoros». Oficiale konkludiĝis periodo de divido kaj ŝiro kaj komenciĝis periodo de amikeco.

La Papo kaj la angla Primaso ne kaŝis, ke gravaj problemoj restas solvendaj. De 1966 ĝis hodiaŭ la marŝado al la unueco faris konsiderindajn progresojn. Tion agnoskis antaŭ nelonge la prezidanto de la Sekretariato por la unueco de la kristanoj, kard. Willebrands, kiu diris: «La plej grava dokumento ĝisnun koncernas la Sanktan Eŭkaristion kaj estas sendube la deklaro publikigita la pasintan decembron de la miksa internacia komisiono de anglikanoj kaj katolikoj».

En la komisiono partoprenas teologoj kaj juristoj: 11 katolikoj, 11 anglikanoj. La komisiono trovis larĝan doktrinan interkonsenton pri la problemo de la pastra ofico kaj de la ordino; ĝisnun ĝi ne pritraktis la problemon koncernantan la ordinojn de la anglikanaj pastroj de post la disiĝo. Espereble ĝi superos la malfacilaĵojn.

▶ SEKRETARIATO POR NEKREDANTOJ

En marto okazis kunveno de la episkopoj membroj de la sekretariato por nekredantoj, en la antikva salono de la episkopa Sinodo en Vatikano, sub la direkto de kard. Franz Koenig, ĉefepiskopo de Vieno.

Temoj: rilatoj inter la kristanismo kaj la marksistaj ideologioj en la nuntempa mondo; evangelizado en rilato al la ateismo kaj sekularigo.

▶ EKUMENA RITO EN MILANO

Okaze de ekumena rito de la anglikana komunumo de Milano (Italujo) parolis inter aliaj la episkopo de Crema. Kortuŝite li memorigis, ke pli ol 2500 sacerdotoj, pastoroj kaj ortodoksaj popoloj estis, kiel li, en la koncentrejo de Dachau. Sed ilia ĉeesto montris, kiel homa kaj kristana amo povas venki malamon. Luteranaj pastoroj, katolikaj kaj ortodoksaj sacerdotoj kunpreĝadis en barako. Ortodoksoj ofte partoprenis en la katolika eŭkaristio. Tiel naskiĝis vera frateco spirita, eĉ sakramenta. La episkopo konkludis: «De tiam la ekumenismo ĝerminta inter pikdratoj faris multajn paŝojn antaŭen. Hodiaŭ, preĝante kune, ni jam sopiras al la tago, en kiu ni ĉiuj povos ankaŭ partopreni en la sama eŭkaristia tablo».

▶ TAIZÉ

Inter Kristnasko kaj Epifanio ĉirkaŭ 3000 gejunuloj de diversaj nacioj kaj religiaj konfesioj diskutis pri la temo «Agado kaj kontemplado por realigi kunulecon». Tie oni preparas la koncilion de la gejunuloj, kiu komenciĝos la 30-an de aŭgusto.

▶ KOMUNA KREDOKONFESO DE PAPO PAŬLO KAJ PATRIARKO SHENOUDA III

La kopta patriarko Shenouda III, ĉefo de la Eklezio de Aleksandrio kaj patriarko sur la sidejo de Sankta Marko, vizitis Papon Paŭlon VI dum semajno. Antaŭ lia foriro je la 10a de majo 1973 ambaŭ eldiris komunan kredokonfeson, kies kompleta teksto aperis en L'Osservatore Romano, franca kaj germana eldonoj, de 18-5-73. El tiu teksto ni tradukas la ĉi-suban parton:

«Ni renkontis unu la alian kun la deziro fari pli intensaj la rilatojn inter la du Eklezioj kaj serĉi konkretajn rimedojn por forigi la malhelpojn, troviĝantajn sur la vojo de nia efika kunlaborado je la servo al Nia Sinjoro, Jesuo Kristo, kiu konfidis al ni la taskon de la repacigo, por repacigi la mondon kun Si mem (2 Ko 5,18-20).

Fidelaj al la Apostolaj Tradicioj, donitaj al niaj Eklezioj, kaj de ili konservataj, kaj en unu spirito kun la tri unuaj ekumenaj Konciloj, ni konfesas nian kredon al Dio, Dua Persono de la Sankta Triunuo, Vorto de Dio, Brilo kaj Gloro kaj perfekta Bildo de lia Esenco, kiu akceptis por ni la karnon, akceptante por si mem realan korpon kaj racian animon, kaj kiu partoprenis en nia homeco, escepte de la peko.

Ni konfesas, ke Nia Sinjoro, Dio, Savanto kaj Reĝo Jesuo Kristo, estas perfekte Dio laŭ sia dieco, perfekte homo laŭ sia homeco. En Li estas unuigita lia dieco kun lia homeco, en unueco reala kaj perfekta, sen mikso, sen konfuziĝo, sen ŝanĝo, sen divido, sen disigo. Lia dieco neniam, eĉ ne unu momenton, estis disigita de lia homeco. Li, kiu estas la eterna kaj nevidebla Dio, fariĝis videbla en la karno kaj akceptis al si la formon de servanto. En Li restis ĉiuj proprecoj de la dieco kaj de la homeco en unu reala unueco, perfekta, nedividebla kaj nedisigebla.

La dia vivo estas donita al ni kaj estas nutrata per la sep sakramentoj de

Kristo kaj lia Eklezio: la bapto, la konfirmo, la sankta Eŭkaristio, la pekokonfeso, la sankta oleo por la malsanuloj, la nupto, la ordino.

Ni honoras la Virgulinon Marian, Patrino de la vera Lumo, kaj ni konfesas, ke Ŝi ĉiam estas Virgulino, ke Ŝi estas la Patrino de Dio. Ŝi estas nia propetantino kaj kiel "Theotokos" (Dipatrino) Ŝi superas laŭ digno la ĥoron de la anĝeloj».

Ni povas diri, ke la Papo kaj la Patriarko per tio konfirmis solene la definitivan forpason de la teologiaj diversaĵoj pri la Enkarniĝo de la unika Filo de Dio, kiuj ekestis pro malfacilaĵoj de esprimado kaj vorttrezoro, kaj kiuj kaŭzis la disigon antaŭ 1500 jaroj. Interkonfesia komisiono helpos per studado kaj kunlaborado, per karito kaj reciproka respekto al la restaŭro pli rapida de kompleta unuiĝo.

El «*Vojo - Vero - Vivo*»

MALDORMENA

Finfine sukcesis la flegistino en sanitaro vekigi pacienton, kiu sola dormis en la atendejo: Do, pro kio vi suferas? — ŝi demandas lin kompateme. — Mi petas mi suferas pro maldormeno.

KONFESO

Mia edzino ĉiam mienis tiel enuige, ke min forlasis ĉiu emo je intimajoj, kaj mi iradis en bierejon. Tiel mi fariĝis notorikulo.

JUĜEJA ENKETO

— Per la motociklo mi forveturis, ĉar mi estis malpli influita de alkoholo al ĝia posedanto, kiun mi dumvoje perdis.

— Kial vi ne revenis lin trovi?

— Ĉar mi forgesis, ke li kun mi veturis.

EL GASTEJA VIVO

Diru al ŝi, ke sinjoro Novák ĵus forlasis gastejon, por iri hejmen!

AGRABLA DEVO

La ĉefo: Sed ne rakontu al iu, ke mi plialtigis vian salapron.

Oficisto: Ne, sinjoro ĉefo, mi eĉ ne rakontos pri tio al mia edzino!

landaj reprezentantoj

Aŭstralio

S-ro V.J. Timmins
73 Alexandria Parade
Hornsby N.S.W.

Aŭstrujo

S-ro W. Mudrak
Beatrixgasse 19/9
A-1030 Wien III - P.K. 105.713

Belgujo

S-ro Eugeen Paesmans
Lange Koepoortstraat 64
B 2000 Antwerpen, tel. 321751
P.K. 41 45 89

Brazilo

B.E.L. (Brazilia Esper. Ligo)
Praça da Republica 54, 1e
Rio de Janeiro

Britujo

S-ro Norman W. Vigar
28 Franklands Drive, Weibridge
13000 Addlestone - Surrey (Anglujo)
KT 15 1 EG
tel. Weybridge (0932) 45743

Ĉeĥoslovakio

S-ro Aleš Berka
Na Harazi 1423
75501 Vsetín

Francujo

S-ro Gaston Veron
Place de la Petite Bruyère
F 61700 Domfront (Orne)
CCP Rouen 1188-63 Z

Germanujo

S-ro Gerhard Vogel
Tondernstr. 36
D 5 Köln 30 - P.K. Köln 166355

Hispanujo

S-ro Miguel Martinez
Av.da San José 105, Pral. 3a
Zaragoza

Irlando

S-ro O'Reilly P.J.
« Woodbine » Bluebell
Dublin 12

Italujo

D-ro C.C. Ferrari
Viale dei Mille, 37
I-20129 Milano - tel. 267895
P.K. 3-7791

Japanujo

S-ro Matubara Hatirô (Anselmo)
Namimatu-tyô, 4 ban, 5 gô
596 Kisiwada, Oosaka-hu

Jugoslavio

S-ro Ferenc Dongò
Javorska ul. 4
24413 Palič

Kanado

S-ino Pauline Proulx
790-80 E Rue Est
Charlesbourg, Québec

Kolombio

P. Louis E. Palacios Toral
Apartado Aéreo 12-03
Cartagena

Koreo

S-ro Paul Kiseng Kim
I. P. O. Box 2752
Seoul - South-Koreo

Madagaskaro

S-ro Ramanantsoa Claude
Dominique Gérard
Cité Ambohipo 469
Tananarive

Nederlando

S-ro S.P. Smits
Stadhoudersring 326
Zoetermeer
P.K. 68 51 24

Nov-Zelando

D-ro Hamway Johano
29 Arran str. Avondale
Auckland SW. 3

Polujo

Pola Katol. Unuiĝo Esper.
41800 Zabrze 1, skr pt. 68

Portugalujo

S-ro M. M. Lourenço Gouveio
Caixa Postal 456
Funchal-Madeira

Svislando

S-ro J. Lutz-Parolo
Himmelrichstr. 61
CH 6010 Kriens LU
P.K. 60-1739

Urugvajo

D-ro R. Zeballos Morales
Fray Marcos (Flor)

Usono

S-ro H. S. Corlett
7605 Winona Lane
Sebastopol, California 95472

espresso
grafica

rajtigo de la tribunalo de milano n. 208
(27 majo 1971)
respondeca direktoro:
longoni ferdinando
via s. ambrogio 2 / tel. 9960050
I / 20051 limbiate (mi)
presejo: scuola grafica
istituto salesiano s. zeno
via minzoni 50
37100 verona

ekspedo per poŝtabono / gr. III/70

